

P R O G R A M O

de la

DEKTRIA SANMARINA
UNIVERSITATA
SESIO

SUS 13
1994-08-27/09-04
(1693/94pFR)

de la

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

(AIS) SAN MARINO

Tredicesima Sessione Univesitaria Sanmarinese (SUS 13)
dell Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino.

Dreizehnte Sanmarinesische Universitäre Studien-tagung (SUS 13)
der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino.

Thirteenth Sanmarinian University Session (SUS 13)
of International Academy of Sciences (AIS) San Marino.

Trezième Séance Universitaire (SUS 13)
de l'Académie Internationale des Sciences (AIS) San Marino

Jura sidejo: p.a. Dicastero PI e Cultura
Contrada Omerelli 23, RSM-47031 San Marino Città

Sekretariejo: Kleinberger Weg 16B, DE-33100 Paderborn

La laborlingvoj de SUS 13 estos:
Le lingue di lavoro di SUS 13 sono:
The working languages of SUS 13 will be:
Die Arbeitssprachen von SUS13 sind:
Les langues de travail de SUS 13 seront:

La Internacia Lingvo (ILO)
e le lingue ethniche ufficiali dell'AIS
and the ethnic official languages of AIS
und die ethnischen offiziellen Sprachen der AIS
et les langues ethniques officielles de l'AIS

(Italiano - Deutsch - English - Français)

SEKCIOJ (fakultatoj) kaj FAKAROJ (departementoj) de AIS

1. KIBERNETIKO

Dekano: senatano OProf. Bengt-Arne WICKSTRÖM dr., Berlin, D
Vicdecano: AProf. Dr.habil. Reinhard FÖSMEIER, München, D

Fakaro 1.1.: Antropokibernetiko
Fakaro 1.2.: Ĝenerala kibernetiko
Fakaro 1.3.: Inĝeniera kibernetiko
Fakaro 1.4.: Biokibernetiko

2. HUMANISTIKO

Dekano: Senatano OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI, dr., Torino, I
Vicdecano: AProf. Franciszek SKALNIAK, dr.hab., Jawoizno, PL

Fakaro 2.1.: Bazaj antroposciencoj (neparametraj)
Fakaro 2.2.: Sociosciencoj (neparametraj)
Fakaro 2.3.: Artsciencoj (neparametraj)
Fakaro 2.4.: Integraj kultursciencoj

3. STRUKTURSCIENCOJ

Dekano: OProf. Horst S. HOLDGRÜN, dr.habil., D
Vicdecano: Senatano OProf. Carlo MINNAJA, dr., Padova, I

Fakaro 3.1.: Pensadstruktursciencoj
Fakaro 3.2.: Imagadstruktursciencoj
Fakaro 3.3.: Formalaj matematikaj sciencoj

4. FILOZOFIO

Dekano: OProf. Ignat BOCIORT, dr., Timișoara, RO
Vicdecano: AProf. Werner STROMBACH, dr., Dortmund, G

Fakaro 4.1.: Filozofiaj bazosciencoj
Fakaro 4.2.: Filozofiaj valor-teorioj
Fakaro 4.3.: Metasciencoj

5. NATURSCIENCOJ

Dekano: Senatano OProf. Rüdiger SACHS, dr., Hamburg, D
Vicdecano: OProf. Hans-Michael Maitzen, dr., Wien, A

Fakaro 5.1.: Substancikoj
Fakaro 5.2.: Mondikoj
Fakaro 5.3.: Biosciencoj

6. MORFOSCIENCOJ

Dekano: Senatano OProf. Dr.habil. Tyburciusz TYBLEWSKI, Jelenia
Gora, PL
Vicdecano: OProf. Mario GREGO, dr., Venezia, I

Fakaro 6.1.: Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado
Fakaro 6.2.: Ilarmorfologio
Fakaro 6.3.: Mediplanado

PROGRAMO por la 13-a SANMARINA UNIVERSITATA SESIO (SUS13)
de AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Stato: 1994-06-24/1693 pFR

1. MALFERMO, OFICIALAJ KUNSIDOJ KAJ FERMO

Dato	Tago	Horo	Okazaĵo	Salono
08-27	sa	15-19	Senatkunsido	Senatejo
08-28	di	9-11	Sekretariejo funkcias	Sekretariejo
		11-12	Ekzamenofico-kunsido	Galilei
		12-13	Konsulthoroj	Galilei
		12-13	AIS-Deutschland	Komenský
		15-17	Asembleo de la Subtena Sektoro	Komenský
		17-19	Solena Malfermo	Boulanger
		20.30-	Akademidomaro	Galilei
08-29	lu	20.30-	Sekcikunsidoj ¹	laŭsekcio
08-30	ma	20.30-	Kunsido de Arta Sektoro	Gandhi
		20.30-	Kunsido de Teknika Sektoro	Galilei
		20.30-	Senatkunsido	Senatejo
08-31	me	20.30-	Forumo pri Akademiaj Rekomendoj	Boulanger
09-01	ja	20.30-	Akademia Libroservo	Komenský
09-02	ve	15-17	Ĝenerala Asembleo de Scis	Boulanger
		17-19	Fermo de SUS 11	Boulanger
		20.30-	Senatkunsido	Senatejo

II. SCIENCAJ KURSOJ KAJ PRELEGSERIOJ PO 8 STUDHOROJ
plus libervola finekzameno por enskribiĝintoj

Ĉiuj sciencaj kursoj kaj prelegserioj okazos po 2 horoj tage (lunde, marde, merkrede, vendrede) en la samaj tempointervaloj.

Sekcio 1: Kibernetiko (salono Schmidt)

K01	OProf.Dr.habil.Helmar FRANK (D): Kibernetika estetiko- instigo kaj aplikadkampo de la informacipsikologio (9.00-11.00)
K02	AProf.DR.habil. Reinhard FÖSMEIER (D): Paradoksoj en la scienco (11.00-13.00)

Sekcio 2: Humanistiko (salono Komensky)

H01	AProf. Nina KORĴENEVSKAJA (RUS): Pri la rusa pentarto de la 20-a jarcento (9.00-11.00)
H02	ADoc.Dr.Věra BARANDOVSKÁ-FRANK (CZ): La latina kiel lingvo internacia (11.00-13.00)

¹Jarkunvenoj de Tutmonda Asocio por Kibernetiko, Informa-
diko kaj Sistemiko kaj Filozofia Asocio Tutmonda okazos sam-
tempe kaj samloke kun la sekcikunsidoj de la sekcio 1 (TAKIS)
kaj 4 (FAT)

- H03 PDoc.Dr.Werner BORMANN (D): Ekonomiaj kaj interlingvistikaj elementoj de la Eŭropa Unio (15.00-17.00)
- H04 OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI (I): La judaj lingvoj !!En Salono Descartes!! (15.00-17.00)

Sekcio 3: Struktursciencoj (salono Eŭkleides)

- S01 OProf. Horst S. HOLDGRÜN, dr. (D): Topologiaj grupoj (9.00-11-00)

Sekcio 4: Filozofio (salono Descartes)

- F01 PDoc.Helmut ANGSTL, dr. (D): Enkonduko en la logikon (9.00-11-00)

Sekcio 5: Natursciencoj (salono Galilei)

- N01 Wolfgang GÜNTHER, dr. (D) kun OProf. Rüdiger SACHS, dr. (D): Regiona anestezo en teorio kaj praktiko (9.00-11.00)

- N02 OProf. Rüdiger SACHS, dr. (D): Zoonozoj (11.00-13.00)

- N03 ASci. Eva P.G.Bojaĝieva (BG) kun OProf. Rüdiger SACHS, dr. (D): Hormonoj: strukturo kaj meĥanismo de ilia efiko kaj kaŭzoj malsaniĝi (15.00-17.00)

- N04 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA (PL) kun OProf. Rüdiger SACHS, dr. (D): Naturkuracado ekde antikveco ĝis nun !!En salono Eŭkleides!! (11.00-13.00)

Sekcio 6: Morfosciencoj (salono Gandhi)

- M01: ASci. Stephan MAUL kun OProf. Dr.habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI (PL): Komunikadscienco kaj ĵurnalistiko (9.00-11.00)

- M02: OProf. Dr.habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI (PL): Individuo en la socio (11.00-13.00)

- M03: Seva Švarcaitė (LT) kun OProf.Dr.habil Tyburcjusz TYBLEWSKI (PL): Erozio de la tero (15.00-17.00)

III. LINGVOKURSO (sabate 17.00-19.00 kaj dimanĉe 9.00-13.00 kaj 15.00-17.00), salono Gandhi

- L01 ASci Eva BOJAĜIEVA (BG): ILO por sciencistoj (kun antaŭkonoj)

IV. DEBUTPRELEGOJ KAJ PROJEKTAKCEPTIGAJ PRELEGOJ

Sekcio 6: Morfosciencoj (salono Gandhi)

- M11 ASci. Stefan MAUL (G): Enkonduko en la arton skribi. Debutprelego jaŭde 17.00-18.00

V. LIBERAJ PRELEGOJ (kun sekvonta diskuto kaj paŭzo po 40 minutoj)

Sekcio 2: Humanistiko (salono Komenský)

- H21 Mag. Maria BUTAN (RO): Subjektivaj aspektoj de leksikaj pruntoprenoj lunde 17.00-17.40

- H22 OProf. Carlo MINNAJA, dr.: Esperantaj vortaroj: ekzemploj pri la itala lunde 17.40-18.20

- H23 Stanislava CHRDLOVÁ, Mgr.: Gepatra klaso lunde 18.20-19.00

- H24 OProf.Aleksandr D. Duliĉenko, dr. (RUS): Pri la ĝeneralaj aspektoj de nuntempa interlingvistiko merkrede 17.00-17.40

- H25 ADoc.Dr.Věra BARANDOVSKÁ-FRANK (CZ): Instrulingvo kaj lern-sukceso merkrede 17.40-18.20

- H26 OProf. Dr.habil.Helmar FRANK (D): Tradukigi fremdlingvajn kursojn aŭ lernigi la instrulingvon? merkrede 18.20-19.00

Sekcio 4: Filozofio (salono Descartes)

- F21 Ion Otiman, prof. (RO): La scienteoria kaj universitatpolitika pravigo de la rolo de interlingvistiko en la universitato de Timișoara jaŭde 17.40-18.20

- F22 AProf.Werner Strombach, Dr. (D): Evolution und Intelligenz in philosophischer Sicht jaŭde 18.20-19.00

Sekcio 5: Natursciencoj (salono Galilei)

- N21 Seva ŠVARCAITĖ (LT): Migrado de birdoj tra Eŭropa kontinento marde 17.00-17.40

- N22 ADoc.Dr. Petr CHRDL (CZ): Specifaj trajtoj de faka verkado marde 17.40-18.20

Sekcio 6: Morfosciencoj (salono Gandhi)

- M21 OProf. Dr.habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI (PL): Racia esperado - la epokaj pruvigoj marde 17.00-17.40

- M22 ADoc.Mag. Alicja LEWANDERSKA (PL): Aŭdvidaj instrumentodoj marde 17.40-18.20

VI. KONCIZPRELEGOJ

dekkvinminutaj, kompletigitaj surloke. La loko kaj tempo estos anoncata surloke dum SUS.

SUS 13 - Programa resumo

	salono / sekcio	9 - 11	11 - 13	P	15 - 17	17 - 19	P	ekde 20:30
SABATO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6					L01 Bojaĝieva		
DIMANĈO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6		AIS-Deutschl. Ekz.of. Koksult. L01 Bojaĝieva		SubS-Asembleo L01 Bojaĝieva	Solena Malfermo		Akademidom.
LUNDO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	K01 Frank H01 Korjencevska S01 Holdgrün F01 Angst N01 Günther M01 Maul	K02 FöBmeier H02 Barandovská N04 Lewanderska N02 Sachs M02 Tyblewski		H03 Bormann H04 Pennacchiet N03 Bojaĝieva M03 Ŝvarcaité	H21 H22 H23		1 2 3 Sekci- 4 kunsidoj 5 6
MARDO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	K01 Frank H01 Korjencevska S01 Holdgrün F01 Angst N01 Günther M01 Maul	K02 FöBmeier H02 Barandovská N04 Lewanderska N02 Sachs M02 Tyblewski		H03 Bormann H04 Pennacchiet N03 Bojaĝieva M03 Ŝvarcaité	N21 N22 M21 M22		TeS - kunsido ArS - kunsido.

	salono / sekcio	9 - 11	11 - 13	P	15 - 17	17 - 19	P	ekde 20:30
MERKREDO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	K01 Frank H01 Korjencevska S01 Holdgrün F01 Angst N01 Günther M01 Maul	K02 FöBmeier H02 Barandovská N04 Lewanderska N02 Sachs M02 Tyblewski		H03 Bormann H04 Pennacchiet N03 Bojaĝieva M03 Ŝvarcaité	H24 H25 H26		Akad. Forumo
ĴAŬDO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	K01 Frank H01 Korjencevska S01 Holdgrün F01 Angst N01 Günther M01 Maul	K02 FöBmeier H02 Barandovská N04 Lewanderska N02 Sachs M02 Tyblewski		H03 Bormann H04 Pennacchiet N03 Bojaĝieva M03 Ŝvarcaité	F21 F22 M11		Akad.Libroses.
VENDREDO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	Finelzamenoj	Finelzamenoj		SciS-Ĝen.Asembl.	Solena Fermo		
SABATO	Boulanger Schmidt 1 Komenský 2 Ενκλιδες 3 Descartes 4 Galilei 5 Gandhi 6	Novjara Sanmarina Festo 1694 pFR						

SubS = Subtena Sektoro, ArS = Arta Sektoro, TeS = Teknika Sektoro, SciS = Scienca Sektoro

VII. MEDIOTEKO (salono Boulanger)

Prezentado de la AIS-videokursoj el la medioteko de AIS okazos laŭ la sama principo kiel kursoj kaj prelegserioj.

Akiri de studunuoj per medioteka kurso nur eblas surbaze de fina ekzameno trapasita kun noto minimume 7/10. Eblas senpaga senekzamena partopreno.

La listo de la videokursoj estos je dispono en sekretariejo de SUS.

VIII. FINEKZAMENOJ

La finekzamenoj por kandidatoj, kiuj celas per adapta adopto aŭ per origina studo akiri ĉe AIS la agnoskon de sia akademia nivelo (bakalaŭreco aŭ magistrecio aŭ doktoreco aŭ habilit-doktoreco) okazos vendrede la 2-an de septembro.

La kandidatprelegoj kiel partoj de la finaj ekzamenoj estas publikaj. Iliaj horoj kaj temoj estos afiŝitaj.

Skribaj ekzamenoj (inkluzive la kursfinaj ekzamenoj) okazos jaŭde vespere kaj estas nepublikaj. Buŝaj, ankaŭ nepublikaj fakekzamenoj okazos laŭ interkonsento kun la ekzamenantoj.

La ekzamenofico konsistas el jenaj akademianoj:

Direktoro: OProf. F. Pennacchietti

Sekcio 1 (kibernetiko): AProf. R. FÖSmeier

Sekcio 2 (humanistiko): AProf. S. Kuznecov

Sekcio 3 (Struktursciencoj): OProf. Minnaja

Sekcio 4 (Filozofio): OProf. Bociort

Sekcio 5 (Natursciencoj): OProf. Maltzen

Sekcio 6 (Morfosciencoj): OProf. Tyblewski

La duan membron de la ekzamenofico oni elektos inter la partoprenantoj de SUS.

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj dum SUS

Enskribiĝintoj al la kurso rajtas postuli oficialan ĉeestateston, se ili ĉeestis minimume 3/4jn, kaj noton, se ili partoprenis la kursfinan ekzamenon.

Por la kandidato antaŭ ol finekzameniĝi necesas, ke li enskribigu sin al minimume 3 kursoj de SUS, inter kiuj minimume 1 devas esti el la sekcio, en kiu li kandidatiĝas; minimume 1 devas esti el alia sekcio; maksimume 1 de la 3 devigaj kursoj povas esti lingvokurso. En minimume 1 kurso la kandidato devas partopreni la ekzamenon ricevante minimume la noton 6/10, aŭ 7/10 se temas pri kurso el la medioteko. Eblas ripeti la ekzamenon.

ATENTU: Pro la ĝis nun ne malofta prezentiĝado de kandidatoj al la fina ekzameno sen kompletigi kaj disponigi ĉiujn necesajn erojn konforme al la ekzamenregularo al la ekzamenofico, oni povas aŭ rifuzi, ke la kandidato havigu mankantan eron nur post la publika fina ekzameno aŭ li devos pagi krompagon rekompence pro la kromlaboro. La proceduro por plenumi ĉiujn kondiĉojn necesajn por akiri la agnoskon de la sciencista grado ĉe AIS ne rajtas daŭri pli ol 2 jarojn post la finekzameno.

Prelegoj dum SUS

En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj estu en ILo. La partopreno de unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj!) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. La prelegkunsidoj dividi la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ ŝarĝitoj de ili.

Okazontaj (ĉiuj en ILo) debutprelegoj de novaj profesoroj kaj docentiĝ-prelegoj de estontaj plenrajtaj docentoj de AIS ne daŭru pli longe ol po 45 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton 60) minutoj. La egala tempo estas je dispono por invititaj prelegoj en ajna oficiala lingvo de AIS kaj por projektakceptigaj prelegoj (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan akiron (ne adopton) de titolo ĉe AIS. En al programokemo tiuj kvar tipoj de prelegoj estas egale indikitaj per la cifero "1" post la litero de la koncerna sekcio.

Liberaj prelegoj en ajna oficiala lingvo de AIS ne daŭru pli longe ol po 25 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton 40) minutoj. Ili estas indikitaj per la cifero "2" post la litero de la koncerna sekcio. Ankaŭ de liberaj ISKanoj, t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS, libera prelego estas akceptebla fare de la dekanano de la koncerna sekcio.

Kromaj koncizprelegoj daŭros po 10 ĝis 15 (inkluzive demandoj kaj paŭzetoj 20) minutoj en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas ankoraŭ post la limdato post la starigo de la programo (eĉ surloke) ofertablaj al la (vic)dekanano aŭ (vic)fakarestro de la koncerna sekcio.

Rajtoj de aliĝintoj

La nura SUS-aliĝo rajtigas:

- senpage partopreni ĉiujn kursojn, prelegojn, prelegseriojn, ekzamenigojn kaj oficialaĵojn (nur necesas enskribiĝi al kursoj aŭ prelegserioj, se oni celas ĉeestadateston aŭ ekzamen-partoprenon pri ĝi: enskribiĝkotizo al 1 kurso estas 0,3 AKU)
- ricevi la programkajeron kaj je la fino de la SUS la liston de la partoprenantoj.
- senpage partopreni ĉiujn erojn de la kadra programo por kiuj la programo ne indikas pagendan kromkotizon.

Bonvolu noti, ke la kotizo ne koncernas kotizojn por adapta adopto, kromaj ekzamenoj por akiri originalan gradon, kurskotizojn, k.s.

M o n o

Cele plisimpligon kadre de AIS, prezindikoj prefere okazas en "Akademiaj Kotiz-Unuoj" (AKU); 1 AKU estas la laŭeble stabila jarkotizo de la subtena sektoro, t.e. momente 100,- DM aŭ 100000,- LIT. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de Internacia Scienca Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio (ITK) de AIS havas, konforme al la regularo pri kotizoj kaj mastrumado, "servobonhavo", t.e. AIS-konton, de kiu eblas

- senkoste ĝiri al aliaj individuaj AIS-kontoj aŭ pagi al AIS
- je 3%-a kosto depreni dum SUS monon en DM aŭ en LIT
- ĝiri al banka aŭ poŝta ĉekkontoj je 5%-a kosto (aŭ senkoste, se temas pri pagendaj fakturoj por varoj aŭ servoj necesaj por agadi favore al celoj de AIS).

Honorarioj aŭtomate estas alkalkulataj al la servobonhavo, pagendaj aliĝ-kaj membrototizoj aŭtomate dekalkulataj.

Restadkosto dum SUS estas surbaze de fakturoj senkoste pageblaj el la servobonhavo de la partoprenanto, kiu zorgu bon-tempe pri sufiĉa kontostato.

Invito al SUS 14 en Sibiu, Rumanio:

La 14-a Sanmarineca universitata studadsesio okazos de la sabato, 24-a de septembro, 14 h (preparaj lingvokursoj; 19.30 h solena inaŭguro) ĝis sabato, la 1-a de oktobro, 19 h (solena fermo; bankedo). Sekvos ekskursaj dimanĉoj kaj, la mateno de la 3-a de oktobro, partopreno en la inaŭguro de la nova studjaro. Eblas sekve partopreni post-SUS-an studadsesion en la universitato Nitra (Slovakio) de la 5-a ĝis la 8-a de oktobro, kaj (la 10-an de oktobro) la inaŭguron de la nova AIS-ejo en Praha (Ĉeĥio), kiun disponigas al ni la Karla Universitato.

SUS 14 estas aparte alloga pro diversaj specialaĵoj:

- * Jam 115 studentoj - ĉiuj en la ekzaktscienca fakultato - studas kadre de la kunlaborkontrakto inter AIS kaj la Universitato de Sibiu; la filologia fakultato planas estonte ankaŭ kunlabori, probable jam ekde SUS 14.
- * La prezoj estas aparte malaltaj: partoprenontoj el orienteŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj pagos krom enskribiĝkotizo (30 DM) nur 20% de la kotizoj por kursoj kaj ekzamenoj, en kiuj ili (ne devige) enskribiĝos, kaj, loĝante en la studenta domo por la tranokto nur 2 DM (por studentoj nur 1 DM), por la manĝaĵo en la studenta restoracio tage (3 manĝaĵoj) 3 DM (por studentoj 2 DM). La kostoj en la Hotelo Sport estas la jenaj: ĉambro kun 1 lito kostas nokte 32 DM (kun matenmanĝo), lito en dulita ĉambro 26 DM, kaj lito en 5-lita apartamento (du ĉambroj, unu banĉambro) kostas 20 DM (kun matenmanĝo). Se oni deziras manĝi trifoje en hotela restoracio, tio kostas 15 DM/tago.
- * okazos gvidataj vizitoj de urbaj vidindaĵoj kaj ekskursaj tagoj (la 2-a de oktobro), bankedo de la subtena sektoro, favoreg-preza vendadekspozicio de Sibiuaj eksportproduktoj (ekzemple: luksaj tekoj je ĉ. 50 DM, dupartaj vojaĝvalizetoj je 150 DM, ledaj kaj aliaj vestaĵoj je 25 ĝis 50 procentoj de la prezoj en la importlandoj).
- * La du komencaj tagoj koincidas tempe kaj loke kun la Rumana Esperanto-kongreso.
- * Jam anoncis kursojn OProf. Bociort (RO), OProf. Frank (D), OProf. Quednau (D), AProf. Szabo (H), OProf. Tyblewski (PL). Petu aliĝilon kun kromaj informoj kaj tuĵ anoncu eventualajn programkontribuojn al Universitato Sibiu, 2400 Sibiu, B-dul Victorici 10, Faksonumero: 0040.69.415302, Rumanio.

Kore invitas vin:

Mag. Sara Reisenauer
Prezidanto de AIS Rumanio

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentaj personoj:

BOULANGER, George R. (1900-1982)

Fondinto (en 1957) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asociacion 1980 ILOn kiel laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo por fondo de AIS.

DESCARTES, René; latine: Renatus Cartesius (1596-1650)

"la patro de moderna filozofio", kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj, aplikante por ambaŭ racian metodon. Li skizis principojn de planlingvo en letero de 1629-11-20 al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉirkaŭ 300 antaŭ Kristo)

Greka matematikisto kaj natursciencisto, kiu laboris sub Ptolemaios I ĉe la "Museion" en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro "Elementoj", aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manlibron "Geometria optiko" kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

GANDHI, Mohandas Karamchand (1869-1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman rebelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per "salmarĉo kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

GALILEI, Galileo (1564-1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva naturscienco konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksimodeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj, li verkis ne plu en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

KOMENSKÝ, Jan A., latine Johannes A. Comenius (1592-1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

SCHMIDT, Hermann (1894-1968)

Jam en 1941 ĉi tiu fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerigkibernetiko kaj antropokibernetikaj branĉoj.

La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo fare de AIS, bezonas antaŭan permeson de la prezidanto aŭ vicprezidanto aŭ de la direktoro de la Subtena Sektoro. Ekzistas speciala afiŝejo por tia agado de sesianoj.

Dum la sesia semajno bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la deŝoranta sekretariejo de la sesio afiŝotaj sur tiu ĉi informtabulo.

Prezo de la programo: 0.02 AKU

© Kopirajto: Prezidanta Sekretariejo de AIS, Kleinberger Weg 16B, D-W-4790 Paderborn. Ĉiuj eroj de ĉi tiu programkajero estas libere represeblaj fare de ĉiuj.